EKO 2023

Pensu globe, Agu loke! Por la Landa kaj Faka Laboro

Nia aganto pri instruado kaj progreso

Jen la plej gravaj partneroj de la EKO-komunikoj


**EKO 2023 / 53. Septembro 14, 2023**

**Kun partneroj UEA, ILEI, IFEF, UMEA, IKEF, LIBE kaj ELF-AREK**

**Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Elda Doerfler, Gbeglo Koffi.**

**Pezo: Word nur teksto: 40 KB; Ĝia sveltigita PDF: 390 KB. Alk:40 KB Sume: KB 470**

## Kampanjo por konservo de la kursoj en Duolingo




En la pasinta Bitbulteno ni diskonigis ke la granda kompanio por reta lernado de lingvoj, Duolingo, estis anoncis la malaperigon de la kursoj de Esperanto en aliaj lingvoj krom la angla, inklude de la hispana kurso, kaj ke TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo) lanĉis kampanjon por tion malhelpi. En la pasintaj tagoj, UEA lanĉis alvokon por la revigligo de la kampanjo. Ni rememorigas tion ankaŭ ĉar en nia pasinta eldono enŝteliĝis eraro en la ligilo por kunlabori en la kampanjo. Se tiam vi ne povis tion fari, provu denove ĉe:
https://www.change.org/p/for-the-duolingo-esperanto-courses-por-la-esperanto-kursoj.

El la hispana Bitbulteno 89

## Kursoj en Universitatoj

El la Universitato de Sevilo ni ricevis gravan informon: ĝia Instituto por Eduk-sciencoj proponas kurson kun la titolo Esperanto kiel universitata ilo por instruistoj kaj esploristoj de la Universitato, tute senpagan kaj kun oficiala diplomo. La instruado okazas kunlabore kun *Civiencia*, entrepreno kun ampleksa sperto en la lingvo. Pliajn detalojn, en tiu ĉi ligilo.

Malfermiĝis la eblo enskribiĝi en nova eldono de la kursoj de Esperanto organizitaj de la Ŝtata Universitato por Nacia Edukado de Hispanio (UNED), kun la kunlaboro de Hispana Esperanto-Federacio. Ni rememorigas ke ili estas instruataj rete, kun oficialaj instruistoj kaj konversad-helpantoj, kaj ili estas alireblaj ne nur el Hispanio, sed ankaŭ el multaj landoj el Eŭropo, Latinameriko kaj aliaj kontinentoj en kiuj UNED havas filiojn. Ĝi havigas oficialan diplomon de la Universitato, en du niveloj, A2 (baza en la kazo de Esperanto) kaj B1. Vi povas aliri la gvidilon de la kurso en la retejo

http://www.cuid.uned.es ("modalidad en línea"), kaj pli konkrete en tiu ĉi ligilo. Eblas enskribiĝi ĝis la 23-a de oktobro.

Tirita el la sama Bitbulteno de Renato Corsetti

## Finaj vortoj de la Prezidanto - Belartaj Konkursoj 2023

https://youtu.be/dW2a8s9C4ao

mga

## Pli da informoj pri la Infanlibro de la Jaro

Infanlibro de la jaro: La Malbela Knabineto, €10.20. Aŭtoro: **Veronika Marék**
Formato 52 paĝoj, 14 cm, bindita
sesona rabato ekde 3 ekz.
Eldonloko, jaro Nyíregyháza, 2022
Eldoninto Verda Stelo Esperanto-Asocio
Klarigoj: Kortuŝa rakonto pri knabino kies revo plenumiĝas helpe de veraj amikoj.
Tradukado al Esperanto: J. Sárközi, Hungario.
ISBN/ISSN 9786150164670




Eraro smg estis serĉi la titolon en la libroservo de UEA per 'La'. Por trovi ĝin, necesas komenci per 'Malbela'
Ionel Onet donas la ligon: https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=3495

Ionel Onet

## Kurso ĉe la franca roko

La redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe la Kursejo.

Nomo: Sabataj kursoj: Espéranto-Vendée
Gvidantonomo: Victor Coutirier, Lucette kaj Viviane, Patrice Joly, Stéphane Robert.
Loko: La Roche sur Yon, Francio
Aldoninto: gravuristo

Okazos ekde septembro deko da kursoj en Britio. Renato Corsetti donos informojn.

## Hungara ekspozicio en Tata

Tiu urboTata renomas pro artismaj agadoj. Ĝi prizorgis publikan ekspozicion en biblioteko lige kun la UK en 2016 en Nitra, Slovakio.
Agadas senĉese la kolektivo en Tata; apude jen afiŝo kiu diskonigas ekspozicion en loka lernejo ekde septembro.




## La kvincenta komuniko de EKO

La unua komuniko okazis en aŭgusto 2013, unu monaton post mia ekaktiveco en la estraro de UEA, sekve de la elektoj en Islando. Do, la kvincenta komuniko kredeble jam okazis.

smg




## Tago de Paco – UEA mesaĝas

La 21-a de septembro estos la Internacia Tago de Paco. Ni alkroĉas la tekston, kiun preparis Humphrey Tonkin nome de UEA.

## La 100-jara Memorevento de la Fondiĝo de EPA

La skipanoj de Esperanto-fako de Legio de Bona Volo (LBV), diskonigas gravan eventon en Japanio celebre al la 100-jara Jubileo de la Fondiĝo de **EPA (Esperanto-Populariga Asocio)**. Tiun organizon fondis la ŝintoisma komunumo **Oomoto** en 1923. Nian omaĝon kaj gratulon al tiu altvalora organizo ni esprimas per artikolo, kiun verkis Paiva Netto, titolita**"Ni estas tio, kion ni manifestas al la mondo"**. En ĝi la aŭtoro prezentas profundajn kaj gravajn pensojn de famaj aziaj saĝuloj. Bonvolu akcepti nian koran inviton por legado. Kun specialaj salutoj al la Honora Prezidanto de EPA, sinjorino DEGUĈI Kurenai, kaj al la ĝenerala direktoro, sinjoro AGO Takaŝi, ni bondeziras al ĉiuj partoprenantoj ĝueblan kaj ĝuindan memorfeston. Akceptu niajn elkorajn bondezirojn por **pluaj plenplenaj sukcesoj al la centjara EPA!**




Maria Aparecida da Silva www.paivanetto.com/eo; www.religiodedio.org

## Interlingvistoj ekverku!

La redakta teamo de 'Ipi' nun kolektas erojn por la venonta numero, kiu aperos komence de oktobro. Do, jen instigo sendi al ili informojn pri ĉiuj interesaj evoluoj sur la kampoj interlingvistiko kaj esperantologio. Ĉi-kune vi trovos la gvidliniojn por kontribuoj. La redakcia adreso estas ipi@interlingvistiko.net.

Mark Fettes

========= vortoj: 725 =============

**La kolekto de EKO por 2023:** https://www.ilei.info/agado/EKO.php (ĝis 50).

La Komunikoj iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-seminarioj. Entute ĉ. 2700 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.:

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la smg./